# Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Julio-Augusto 2002 73-a jaro, n-ro 7-8 (1165-66)

*Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem*

ISSN 1163.0442 MENSUEL/MONATA

**http://www.sat-esperanto.org/ *** retadreso: satesper@noos.fr**

# - Alikanto -

## tre sukcesa kongreso kun grava evento

## apero de Nova P.I.V.








Supre : La ĉefaj motoroj de la kongreso - gekamaradoj Bustin.
Supre maldekstre: dum laboro
Sube : dum amuziĝo.

**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**

## El la redaktejo...



Karaj gekamaradoj,
tiun ĉi jaron nia kongreso okazis speciale frue, kaj tial vi tenas en la manoj dumonatan Sennaciulon - julio-aŭgusto. En ĝi vi povos legi la unuajn informojn pri la Kongreso kaj ĉefe pri ĝia plej granda evento: apero de la Nova P.I.V. Pli da informoj kaj kompletan raporton vi povos legi en septembra kaj oktobra numeroj. Ekde septembro atendas nin nova agadjaro kun multe da taskoj. La plej gravapor ĉiuj membroj de SAT estas provi venigi al nia asocio minimume unu novan membron. Se ni tion faros, nia membraro duobliĝos kaj tiam ni povos fari multe pli. Do, ni ĉiuj strebu plenumi tiun kongresan deziron. Uzu viajn feriojn kaj kontaktojn kun geamikoj novaj kaj malnovaj por diskonigi laboristan esperanto-movadon kaj nian SAT. Kuraĝon al ĉiuj.

*Via Redaktoro*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 52€
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
**Commission Paritaire n° AS-74399**
**Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.**

### NOVA PERANTO EN HISPANIO

Nia k-do Marteno BUSTIN, dum la kongreso en Alikanto, rezignis pri sia peranteco (li fariĝis kandidato por la P.K.) kaj transdonis ĝin al la nova peranto. Ni dankas al k-do Bustin pro la laboro farita kaj bonvenigas la novan peranton:

**K-do Pedro A. Hernandez Ubeda**
**c/Sainz de Barand, 3° D**
**ES-28009 Madrid**

Konto: 2038 1787 406000178775
Tel/ 912230692, 667721951
Fakso: 917783961
Rete: esperanto@mi.madritel.es
Bonvolu do ekde nun kontakti lin por la kotizoj kaj aliaj informoj kiuj koncernas SAT.

## NOVA RUBRIKO

Laŭ la propono de la 75-a SAT-Kongreso en Alikanto, "Sennaciulo" lanĉas novan rubrikon: "Kulturfako". La devon ĝin prizorgi prenis sur sin la proponintino...
Ni deziras atentigi, ke la rubriko ne estas tro vasta pro limigitaj eblecoj de la revuo samkiel de la redaktanto.
Ni pretas aperigi en ĝi informojn pri diversaj kulturaj eventoj, organizitaj de SAT, LEA-oj, SAT-rondoj kaj apartaj SAT-aktivuloj. Temas pri teatraj kaj aliaj artaj prezentoj, ekspozicioj kaj similaj artaj aranĝoj.
En la rubriko ni volonte informos ankaŭ pri kultur-edukaj verkoj publikigitaj en Esperanto de niaj membroj kaj grupoj kun kiuj SAT estas en konstanta kunlaboro.
Daŭre aperos la ĝisnuna rubriko: "Ni legis por vi", aperiganta recenzojn pri interesaj libroj.
Informojn por la nova rubriko bonvolu sendi al : Zofia Banet-Fornalowa, Bliska 12, PL-05-070 Raszyn, Pollando, per ordinara poŝto.

*Ek al la laboro por la nova rubriko!*
*Kamaradece, Zofia Banet-Fornalowa*

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

# SUKCESA KONGRESO EN ALIKANTO




## 75-a SAT-Kongreso en Alikanto.
(meritas universitatan diplomon)

De Nagykanizsa al Alikanto estas por esperantisto nur eta distanco, aviadile iom pli ol 4 horoj.

Revidi la gekdojn, scii ke ni povas kundecidi pri la estonto kaj agado de nia asocio, aŭskulti prelegojn, viziti la regionon, jen mallonge SAT-Kongreso, aŭ, ĉu ne estas preferinde paroli pri ĝenerala jarkunveno de SAT.




Ĉi-jare skipo de hispanaj amikoj zorgis, ke ni povis kunsidi en «Universitato de Alikanto». Nu skipo certe estas troigo, ĉar post malfaciloj en HALE, kie oni uzas nuntempe «La Kajerojn el la Sudo» por fifamigi SAT-on kaj laŭdi reakciajn pensojn, restis Marteno Bustin kun sia afablega edzino Liya por duope liveri gigantan laboron, kiu organizado de Kongreso estas.

Evidente pro la fakto ke mi estas SAT-ano, mi neniam povas sendi al vi objektivan raporton, tamen mi klopodas.

Mi volas komenci per listo de plendoj. Mi alvenis dimanĉe la 30an de junio kaj pluvis en loko kie pluvo estas escepto. La taksiisto lasis min ĉe la malĝusta pordo de la Universitato. Mi surhavis tro varman pantalonon laŭ la temperaturo. La enskribiĝo suferis prokraston ĉar mi alvenis je momento de matenmanĝo kaj anstataŭ atendi min, ĉiuj esperantistoj troviĝis en manĝejo. La hispanoj vivas laŭ malsama ritmo ol mi. Plej granda plendo, mi ne spertis malfacilon kiun mi ne povis mem solvi. Eble se mi vizitus infanĝardenon anstataŭ kunvenon de plenkreskuloj mi, trovus (certe) ion por plendi. Do mia plej granda plendo estas ke mi trovas nenion pri kio mi povas plendi.

Mi volas pritrakti la liston de bonaj aferoj. Unu horon post mia alveno mi jam povis kun la gek-doj viziti, sub gvidado de Liya, la urbon Alikanto. Kvankam matene iom antaŭ mia alveno iu studento loĝis en la ĉambro kiu estis dum unu semajno la mia, mi havis vespere freŝan liton kun puraj littukoj. Ĉiutage purigistinoj purigis la ĉambron, kvazaû mi loĝus en luksa hotelo. Nu parolante pri lukso, ni havis je la dispono puran bontemperaturan belan naĝejon kaj ĝardenon. Ni povis uzi tute senpage komputilojn kaj interreton, libere viziti kaj preni librojn en la giganta biblioteko, uzi ĉiujn servojn de la Universitato de Alikanto.

La laborkunsidoj de SAT okazis en granda aŭditorio, kie ni disponis pri ĉiuj iloj de luksa kunvenejo. Bedaŭrinde, kaj notu ke pri tio absolute ne kulpas la organizantoj, troviĝis malagrabla eĥo en la salono, kio malfaciligis la transdonon de informoj. Feliĉe ni povis elekti alian salonon kie la sono estis pli bona. Ŝajnas ke en la granda salono la sono nur estas bona kiam ĝi estas plenplena. (ĉu eble instigo por varbi novajn membrojn?)

Ne estas mia tasko verki raporton pri la laborkunsidoj, sed nur por doni rapidan superrigardon. Konklude mi do povas diri ke ni havis Kongreson en tre luksa loko, en tre agrabla loko laŭ temperaturo kaj aspekto. Neniu kritiko eblas, certe ne pri aferoj, kiujn plenkreskuloj, kun iom da bona volo, mem povis solvi. La nura vera problemo estis la aŭdebleco en la granda salono, sed ĉi tiun problemon kaŭzis pli la malmultnombreco de ni, kongreso-anoj (150) en komparo kun la grandeco de la salono.

Kritikon ni ĉiuj devas sendi al la Eŭropaj politikistoj, kiuj per sia preskaŭ ekstremdekstra politiko, zorgis ke 60 personoj ne povis partopreni nian Kongreson pro manko de